

Zone euro : 3,50 €
Autres pays : 4,50 €

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

Espéranto : vers une culture sociale sans frontières.



Montru ke SAT-Amikaro bone fartas :



Mallongigu vian sieston je kelkaj minutoj...



Plenigu la referendumilon (ene de ĉi numero)



Ĝin poŝte sendu. (L' poŝtmarkon ni duoble repagos!)

Voĉdonu por (aŭ kontraŭ!) la ontaj komitatanoj



E. BARBAY



L. ÉCHAPÉ



P. LEVY



A.S. MARKOV




S. SIRE



S. VAN LANDEGHEM

Sciigu kia leganto de La Sago vi estas



Impeta kaj/aŭ vorema...



Saĝa kaj/aŭ singarda...



Indiferenta kaj/aŭ dubema...

Amase partoprenu l' referendumon !

Kiel uzi l' referendumilon...

En ĉi numero troviĝas la referendumilo, kiu entenas du tre malsimilajn partojn, kiuj estas:

- **unu balotilo**, kiun povas uzi nur SAT-Amikaranoj kiuj efektive regule membriĝas;

Ĉi balotilo entenas du partojn: unuflanke aprobojn/malaprobojn al diversaj demandoj; aliflanke aproboj/malaproboj al elekto de kandidatoj por la onta komitato.

Ĉi balotilo troviĝas ĉe la supra parto de la referendumilo.

Se vi deziras anonime voĉdoni, vi do nepre eltondu ĉi supran parton, kaj enmetu ĝin en kovrilon, kiun vi sendu kune kun la alia parto.

- **unu demandaro**, kiun ĉiuj, *membro aŭ ne*, povas plenigi, tamen ne anonime por membroj (por kontrolo de la rajto uzi la voĉdonilon kiu akompanas la sendadon, ĉu sur la netondita folio, ĉu en la koverto kunmetita.)

sendu tion ĝis la 10a de septembro ĉe:

Lucette Echappé (Referendumo)

16 rue de la Boulogne 44230 St Sebastien s/Loire France

aŭ skanite al lucette.lumeto@laposte.net kune kun lasago@free.fr
(ĉi lasta ebleco evidente ne povas esti uzita por anonime voĉdoni)

Vegane kuiru!

Stekoj kun ruĝaj betoj

(recepto anoncita en LS112)

Ingrediencoj por 6 stekoj:

30 cl da fumajita teo el speco Lapsang-Sučong'
100 g da etgrandaj sekaj sojproteinaĵoj*
5 g da spico «garam masala» (kareo taŭgas)
5 g da cepa pulvoro (aŭ 2 freŝaj cepoj!)
1 kruda ruĝbeto
1 ruĝa cepo (alikorala ankaŭ taŭgas)
250 g da kuiritaj ruĝaj faboj
50 g da tritika gluteno (aŭ simpla tritiko)
5 g da fumajita papriko (nedevisa, povas esti alia spico kiel kareo aŭ pipro, kurkumo...)

P*

* sekaj sojproteinaĵoj =
Fr: protéines de soja
texturées

* k = mallongigo por kaj

Trempi la sojerojn en la teo. Dum ili sorbas likvon, raspi la betojn, pecigi la cepon k* kaĉigi la fabojn (per forko aŭ maŝine) k ĉion kunmiksi. Aldoni sekve la sojerojn k la spicojn k la glutenon, k miksi denove ĉion kune. Formi buletojn k platigi ilin por pate kuiru ilin dum kelkaj minutoj ĉiuflanke kun sufiĉe da oleo.

Kiam la stekoj pretas, kreu laŭ via imagemo burgeron kun salato, saŭco (vidu poste), kukumetoj, fungoj k poreoj patumitaj, avokado, vegetaja fromaĝo...

Mirinda jogurta saŭco ege simpla: unu jogurto (100 ml), citrono, mustardo, salo, pipro, origano, provencaj herboj. Gustumu por ĝustigi la spicecon laŭ via prefero!



NB: ĉi burgerajn stekojn povas tre bone akompani la rostitaj terpomoj, kies recepton vi trovis en LS112!

Serĉis, spertis, adaptis, redaktis kun helpo de Paŭlino (kiu ankaŭ pentris la ilustraĵon) k aliaj, Markovo-Vito 4103

Fino kaj eko

En 2010, vi, la membraro de SAT-Amikaro, fidis min por iĝi komitatano kaj de tiam mi rolis kiel kasisto de nia asocio. Post 8 jaroj en tiu bonvolema posteno, ĉi-somere mi forlasos la komitaton kaj transdonos la kontadon al Alexandre Tchernetzky, ekskontisto kaj ne jam esperantisto.

Per la referendumo, ni elektos novan komitaton, kiu dispartigos la rolojn, i.a. tiun por kasisti kaj rilati kun la kontisto.

Mi gratulas ĉiujn, kiuj kontribuis por plibonigi mian taskon per kuraĝigaj leteroj, mesaĝoj kaj ankaŭ per rimarkoj kiam mi eraris. Aparte, mi ĝojis agrable labori kun Veronik por klarigi la kontadon de la stoko kaj fakturoj; mi bedaŭras ke ni ne sukcesis starigi pli taŭgan programon

por faciligi tiujn malfacilajn taskojn en la libroservo sed fidus la novan skipon por rapide atingi pli trafajn rezultojn.

Kompreneble, mi restas membro de nia asocio kaj laŭbezone helpos la respondeculojn por transpreni la rolon kaj bilanci printempe 2018 pri la nuna jaro.

Al la nova komitato, post nia sukcesa kongreso, mi bondeziras ĉion plej bonan por trovi vojon al renovigo kaj rekreskado de nia asocio.

Guy Martin, kasisto kaj provizora prezidento de SAT-Amikaro



Enhavo



SAT-Amikaro Fino k eko	3
Referendumo	
Kovrilpaĝo	1
Kiel uzi l' referendumilon	2
Ĉu utilas resendi l' referendumilon ?	3
Nia felietono Misŝuoj (13)	12
Ideoj / Rakontoj / Informoj	
Sociale evoluo en novlibera kadro	4
Naciismo kaj Esperanto	5
Laŭmodiĝo : nova pb por abeloj	6
Ekstremcentra kroniko...	7
En nia leterkesto	
Kelkaj personaj notoj	4
Reage al «finan ...veganoj»	7
Help peto	11
Pedagogio	
Slipoj = Familio	9-10
Libro-servo	8
utilaj informoj	10
Recenzoj	
Libro vivas pli longe...	11
Humuraĵoj-distraĵoj	
Vegane kuiru	2
Tra la fenestro	9, 16
B.D. far Sir'	1, 5, 6, 16
Preter /Plu moviĝas la movado	
Pri Greziljono	13
La KancerKliniko laŭ ties vestoj	14-15

Ĉu utilas resendi l' referendumilon ?

Ĉar estas malpli da kandidatoj ol da postenoj provizendaj, kaj la statuto ne indikis minimumon por esti elektita, la nura kialo por esti ne elektita troviĝas en kazo de ne membriĝo al SAT kaj/aŭ al SAT-Amikaro. En la antaŭa numero, mi indikis ke tio povus esti la kazo de Elizabet' - tiel ŝi anoncis dum la kongreso - sed fakte ŝi tuj ordigis tion, kio estis nur malfruo. Mi petas pardonon al ŝi, por tiu ne plu valida indiko.

Do, ne necesas esti lerta aŭguristo por scii per kies manoj stirigis la asocio...

Povas do aspekti al vi ne utila voĉdoni, sed mi volas konvinki vin pri la malo, aludante al la ĵus lastaj balotoj en Francio, kiuj prezentis rekordan nombron da ne-partoprenantoj, kion oni analizis (prave aŭ ne) minimume kiel seninteresiĝon eĉ kiel naŭziĝon.

Ne pensigu la samon pri nia asocio: sendante amase vian referendumilon vi simple montros ke por vi plu gravas la maniero stiri la asocion.

Stiradon far komitato oni povas taksu kiel la malpli malbonan demokratian formon kaj revu al pli bona... Se tiun revon vi havas, profitu el la referendumo por detaligi ĝin, tutcerte ni tre atente legos ĝin, eĉ publikigos ĉi revue!

Serĝo S.

Noto

La kandidatoj estos evidente elektitaj laŭ la nuna statuto, eĉ se estos aprobata la nova, sed esceptokaze pro la nunaj cirkonstancoj por la cetero de la jaro 2017 kaj la tuta jaro 2018.

Lucette, nura nuna komitatano kolektos la voĉdonilojn kaj organizos la voĉnombradon.

NIVELOJ

Ĉiuj artikoloj estas akompanataj de lingv-nivela simbolo: K = Komencantoj
P = Progresantoj
S = Spertuloj

kun asterisko se tradukata franclingven aŭ kun glosaro por lingvaj malfacilaĵoj.



LA SAGO.

CPPAP n° 0322 G 86224. ISSN : 1763-1319.

SAT-Amikaro, 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris

Directeur de la Publication : Serge Sire

Impr. sur papier recyclé par :

L'arbre aux papiers 72100 Le Mans

Dépot légal à parution.

Ĉefredaktanto kaj enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Redakt- kaj kontrol-skipo: Janine kaj Yannick Dumoulin, Lucette Échappé, Luk' Gouverneur, Ĵak LePuil, Petro Levi, Serĝo Sir'.

Partoprenis en ĉi numero: Jade Body, Rolando Cuenot, Lucette Échappé (Lumeto), Veronik' Girard, Luk' Gouverneur P. Grolemond', Izabel LamiRested', Franjo Martin, Guy Martin, Gary Mickle, Jocelyne Monneret, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Jean Selle, Serĝo Sir', Bert Ŝuman, Juliette Ternan.

Kontribuajoj Contributions

Ĉiam bonvenaj! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues! A - faire parvenir au correspondant de rédaction :

Reto: **lasago@free.fr**

Poŝte: **S.Sire, 85 imp des fées, 74330 Sillingy**

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF-, ODT-aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG-, PCX- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuajoj publikigeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de la paraj monatoj ne povas esperi aperigon en la tuj sekvonta numero.

■ *de préférence par internet, textes en format RTF, ODT ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG, PCX ou GIF.*

■ *éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*

■ *Les articles reçus après le 20 des mois pairs ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro immédiatement suivant.*

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Tra la fenestro

Junio 2017 Dzeka

Saluton al ĉiuj,

Se la Francoj havas nun novan prezidenton, baldaŭ SAT-Amikaranoj havos novan prezidanton. En la franca estas dufoje la sama vorto, ne estas la kazo en Esperanto. Temas tiam pri du distingeblaj vortoj (Prezidento kaj Prezidanto), kun malsimilaj prononco kaj ortografio.

Ĉiutage mi miras pro tiu lingvo, pro ĝiaj mil kaj unu eblecoj, ĝia fleksebleco kaj ĝiaj kreivaj eblecoj, dank' al gramatiko samtempe simpla kaj naskanta renovojn.

Kia genia eltrovo!

Unesco ja pravis deklari la jaron 2017 «Zamenhofa jaro». (Zamenhof mortis la 14an de aprilo 1917).

Esperanto estas kiel matrico de multaj aliaj lingvoj. En ĝi oni rekonas parencecon kun pluraj el ili, eĉ kun la eŭska, ege malnova lingvo, kies deveno kaj ligiloj pri parenceco restadas necertaj.

Kia ajn estas ĝia gepatra lingvo, ĉiu povas trovi sin «hejme» en Esperantio pro unu aŭ alia kialo, ĉerpi ŝian/lian

mielon el tiu lingvo difinitatempe kreita, ekkapti ĝin kaj fari ĝin sia.

Kiel rivero ĝi estas ĉiam la sama kaj ĉiam alia. Tio estas kio distingas ĝin inter la aliaj lingvoj; dank' al baza ideo de Zamenhof, la Fundamento, ĝi ne aliformiĝas. Kelkaj riproĉas tion al ĝi; laŭ ili, vivanta lingvo devas evolui laŭ tempo kaj historio. Tamen, dank' al tio, ĝi do plu kompreneblas per ĉiuj kiam ajn aŭ kie ajn oni lernis ĝin. Krome, samtempe ĝia fleksebleco ebligas al ĝi adaptiĝi, alpreni novajn vortojn, ekzemple teknikajn kaj sciencajn vortojn.

Hodiaŭ ĝi fluas tra interreto, interŝanĝiĝas per skajpo, havas aplikaĵojn sur smartfono aŭ, pli ĝuste, komputiltelefono...

Sed tio estas alia rakonto* pri kiu mi parolos venontan fojon.

Ĝis, Dzeka

*Vidu, ankoraŭ plursenca vorto, «histoire» en la franca, kiam oni havas du precizajn vortojn en Esperanto: «historio» kaj «rakonto»



Lingva helpkadro p.9

transsendis Izabel' LamiRested'.

Testudo

pseŭdosciencia
Bilda Deliraĵo
far Sir'
\$05

Saluton! Mi eksciiis
pri via ekzisto...

Ĉu plaĉus al vi aktori
en televida serio bazita sur
via speciala eco?

Ĉu estus rolo por
mia leporkangurua
amikino?

Ne tuj! Sed post kelkaj
epizodoj, oni ja povas ludigi
ŝin por refreŝigi la serion!

do...kial ne?

Malve*!
Ĉi foje mi sukcesis
obteni kontrakton...

Ĉi foje mia ĉefo ne plu povos diri ke
azen-homo kapablas pri nenio....

o o o

*Testudo = tortue / Test-studo = étude par tests.

*Malve = en maniero de malvo, floro pli malpli

violkolora, el kiu oni foje faras infuzajoj. Sed ĉi tie temas pri kontentiga krio: mal-ve!